JUNIO 1948 No. 10

# LA JUNA VIVO

ORGANO POR LA INFANOJ

T.J.O. CENTRO, WEST-GRAFTDIJK, NEDERLANDO, ĜIRO 382363 • JARKOTIZO 1.- NED. GULD. AŬ EGALVALORO

## Por la etuloj:

### Infanaj rimaĵoj:

Kion?
Nenion!
Se pluvas, malsekiĝas;
Se neĝas, blankiĝas;
Se frostas, glaciiĝas;
Se degelas, verdiĝas;
Kaj ĉio, ĉio beliĝas!

Floreto je la vojo,
Sur pontoj kaj bordoj,
Floru kaj ĝojigu,
Ĉar baldaŭ ja vintriĝos.

Fr. Moravec, München, Germanujo.


Kiu el vi povas desegni ion ĉe la rimaĵoj? Kiu sendas la plej belan desegnaĵon ricevos belan fabellibron! Kaj kiam ni festos la 10-jaran ekzistadon de Tutmunda Junular-Organizo (en Groet), ni pendigos ĉiujn viajn desegnaĵojn en la festsalono! Do faru vian eblon! Klare aldonu vian nomon, sekson, kaj aĝon. Sendu ĉion al T.J.O.-Centro en West-Graftdijk, Nederlando. Se vi ne povas desegni laŭ la rimaĵoj, vi fantaziu ion.

---

**Grave!** Je la 1-a de julio komenciĝos la nova administra jaro de L.J.V. Multaj tiam devos pagi sian kotizon. Al tiuj ni urĝe petas: faru tion baldaŭ al la ĉefperanto en via lando. Kiu deziras malaboni bonvolu sciigi tion rekte al nia administrado en West-Graftdijk (Ned.), por ke ni ne vane sendu al vi L.J.V. Al la nederlandanoj ni post 1 Julio prezentos kvitancon.

**Por Komencantoj:**

## LA BATO (Daŭrigo).



Januaro 1935a. Estas vintro kaj dum la tago pluvis. Sed fine la pluvo ĉesis kaj en la vespero la vetero estas bona.

En la domo de la Novanoj la lampo brulas. La Patrino kaj la infanoj sidas ĉirkaŭ la tablo. La patrino kudras. De tempo al tempo ŝi rigardas al la horloĝo. La Patro estas malfrue hodiaŭ. Jam frue en la mateno li foriris kun sinjoro Bonavento al Puerto de la Luz kaj li revenos per aŭtobuso de Las Palmas.

„Luiza," diras Patrino „estas tempo por la etuloj. Ili manĝ*u* nun kaj post tio ili tuj ir*u* dormi."

Unu horo pasas, du horoj pasas ...... Patro ankoraŭ ne revenis.

„Ni manĝ*u*", diras Patrino. Konserv*u* manĝaĵojN por la Patro, Luiza!"

Post la vespermanĝo Pablo kaj Anita iras al siaj dormejoj. La aliaj sidas apud la tablo. La virinoj kudras, Felipo legas.

Subite *iu* frapas sur la pordo en la ĝardeno. Luiza eksaltas pro teruro.

*Iu* malfermas la pordoN kaj sur la sojlo aperas ......s-ro Bonavento. Li estas pala.

KioN signifas tio? *Anstataŭ* Patro venas s-ro Bonavento. Patrino ekstaras kaj rigardas al li. Li donas signoN al ŝi kaj ili malaperas al la koridoro.

Luiza staras apud la pordo: ŝi povas aŭdi la voĉojN, kaptas kelkajN vortojN: „akcidento apud Las Palmas ...... aŭtomobilo glitis sur la malseka asfalta vojo ...... veturis rekte al la aŭtobuso ...... granda ĥaoso ...... la ŝoforo mortis ...... la malsanulejo en Las Palmas ...... mi petegas al vi, ke vi dir*u* la veroN al mi ...... parol*u*, *por ke* mi sci*u* ...... Ĉu li mortis? ...... situacio kritika ......" Luiza tremas.

Patrino malfermas la pordoN. Ŝi estas terure pala. „Luiza! estis akcidento kun Patro. Mi iras kun s-ro Bonavento al Las Palmas. Vi ambaŭ ir*u* dormi. Atent*u* la infanojN. Mi revenos morgaŭ en la mateno."

Patrino vestas sin kaj foriras kun s-ro Bonavento. Ili malaperas en la nokto.

*Korekto:* En le decembra numero troviĝas en ĉi tiu daŭrigrakonto grava eraro. En la lasta linio de „Pri malnova popolo" staras: 1946. Tio devas esti 1496.

**Ne du eraroj.**

Georgo ricevis sabate sian salajron kaj vidis, ke li ricevis dek dolarojn tro multe. Li diris nenion, kaj ĝoje iris hejmen. Sed la sekvantan sabaton li ricevas dek dolarojn tro malmulte kaj li protestas.

„Kial vi la pasintan sabaton ne atentigis min pri mia eraro?" la kasisto demandas al li.

„Unu eraro ne gravas", Georgo respondas, „sed se vi eraras dufoje, tiam mi devas atentigi vin".

**Kaj krome salajron!**

Li havis multajn okupojn, kiujn poste li perdis. Bonŝance li finfine ricevis komunuman oficon. Li devis kontroli la gasaŭtomatojn kaj preni la monon el ili. Post kelkaj semajnoj la komunuma sekretario demandis al li, kial li ne venis al la kasisto por akcepti sian salajron. „Pro ĉielo", li respondis, „ĉu mi krome ricevos salajron?"

**Flata!**

Okaze de festo iu maljuna sinjoro regalis la infanojn de la vilaĝo. Li donis al ili limonadon kaj frandaĵojn. Kaj por amuzi la etulojn li elpensis enigmo-konkurson. Sur la scenejo oni prezentis „mutajn" proverbojn, kaj la infanoj devis diveni ilin.

Dum la unua sceno la sinjoro kuŝas sur la planko. Tiam alvenas viro. Li klopodas levi la sinjoron, sed vane. Poste venas ankoraŭ du viroj, kaj triope ili facile levas la sinjoron. Kompreneble tiu sceno signifis: „Unueco faras forton". Sed kiam la sinjoro demandis al la infanoj, kiu scias la prezentitan proverbon, iu voĉo kriis: „Mi scias! Mi scias! Ne veku dormantajn hundojn!"

**Du riĉaj viroj.**

Li estis viro, pri kiu la aliaj homoj rakontis, ke li estas malriĉa. Li posedis nur tiom da mono, ke li tre modeste povis vagadi tra

la lando, kaj ĝui la belecon de la vivo. Iam li renkontis milionulon. Pro siaj negocoj tiu riĉega sinjoro devis labori tage kaj nokte, kaj li ĉiujare pliriĉiĝis.

La malriĉa viro diris al la milionulo: „Mi estas pli riĉa ol vi!"

„Kiel vi povas diri tion?" demandis la riĉulo.

„Nu, mi havas tiom da mono, kiom mi bezonas, sed vi ne!" estis la respondo.

A. Mehtonen, Oulu, Finnlando.

## Enigmo.

La tuto konsistas el 16 literoj, kaj ĝi estas treege bezonata. 1.11 = sufikse; 3.4.5.16 = sur ĝi ni loĝas; 7.2.16.6.8.9. = publike sciigi; 15.7.11.16 = malalta vastaĵo inter montoj; 15.12 = persona pronomo; 10.13.14.9.11.16 = serpento-simila fiŝo.

La solvon vi sendu antaŭ 1 aŭgusto al TJO-Centro en West-Graftdijk. Inter la ĝuste-solvintoj ni lotumos belan premion.

## La solvo de la enigmo en No 123 (marto '48).

| | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|
| P | A | T | R | I | N | O |
| e | b | r | o | r | u | l |
| r | e | a | n | i | k | i |
| l | l | m | d | s | s | v |
| o | o | o | o | o | o | o |

La premion gajnis David Lang, Glasgow, Skotlando.



## DENASKA ESPERANTISTARO-RUBRIKO.

Post la subita morto de la fondinto de D.E., s-ro Robert Robertson, ni nun devas sciigi ke lia edzino mortis en la fino de Aprilo. Ŝi estis granda helpantino por sia edzo, kaj ŝajne ne povis vivi sen li. Ŝi ripozu en paco!

*Novaj anoj (kun naskiĝdatoj):* Patricia Crower, 102 Shaftesbury Str. Coburg, Victoria, Aŭstralio; Ludoviko-Lazaro Ohana (24-12-'47), 1 rue de la Kasbah, Marrakech, Marokko; Eric Hans Ingmar Weyer (1-1-'43), Tramstraat 22, Velp, Nederlando; Margaret Anwell, (26-3-'47), 141, Ennerdale Rd, Newcastle 6, Britujo; Harold Keller (8-10-'43), München-Allach, Parkstrasse 41, Germanujo; Iris Keller (28-7-'46), je la sama adreso; Gandra Tinker (2-9-'44) kaj Norma Tinker (6-8-'46); Corrie v. d. Horst (14-12-'36), Willie v. d. Horst (31-8-'43), Jannie v. d. Horst (26-11-'44), ĉiuj en Johan Idastr. 32, Rotterdam, Nederlando; Madeleine Renée Schröder (2-6-'47), Wilringswerde, Kr. Altena, Germanujo; Denise Knecht (15-11-'47), Oued-Zem, Maroko; Benjamin Abergel (1-11-'47), 5 rue El Maâda, Meknes-Mellah,

Maroko; Gloria Mas (9-3-'41), Juan Mas (6-5-'43), Francino René Mas (28-2-'45), ĉiuj en Korte Kromhout 60, Rotterdam-Z; Sonja A. E. v. Houtert (27-2-'38), Hoyledestr. 38, Rotterdam, Ned; Ildiko E. Bangha (8-12-'47), Zöldfa-str. 1/B, Györ, Hungarujo; Krysztof Wojciech Toczyski (23-7-'44), Gdynia, Morska 77, Polujo.

## INTERNACIA JUNULARKUNVENO

**en Groet, Nederlando (4-11 aŭg. '48).**

Jen bonaj novaĵoj: Ni sukcesis lui ŝipon, per kiu ni faros grandan ekskurson tra la provinco Nord-Holando. Ni planis jenan ekskurson: De Schoorldam per la ŝipo al Alkmaar, promenado tra la urbo, kaj poste ni veturos laŭ la Nord-holanda kanalo al Purmerend. De tie, ĉirkaŭ la poldero De Purmer, al Edam., kie ne tranoktos. Parte ĉe samideanoj, kaj parte en la ŝipo. Ni rigardos Edam kaj promenos al Volendam. Vespere ni aranĝos festvesperon (la partoprenontoj mem prizorgu ĝin!). La sekvontan tagon ni ŝipveturos de Edam, preter Monnikendam kaj Broek in Waterland al Amsterdamo, kie ni rigardos kelkajn vidindaĵojn. Poste ni reveturos laŭ la pentrinda Zaan-regiono al Schoorl. — Ĉu ne alloga ekskurso?



Panoramo de Groet (Nederlando).

Estas preskaŭ certe, ke ni povos uzi la grandan barakon, do la nombro da partoprenontoj estas nelimigita! Venu do multope!!!

La ne-nederlandanoj klopodu aĉeti vojaĝbiletojn ĝis Alkmaar.

Peto, speciale por la Nederlandaj partoprenontoj: Kiu ankoraŭ ne faris tion bonvolu tuj sendi *f* 5.— al la kasisto (M. v. d. Horst, Joh. Idastr. 32, Rotterdam, ĝirkonto 330139). Alie ni ne povas ri-

gardi vian anoncon serioza. Atentu, ke post 15 junio la kostoj estos 2,50 guld. pli altaj. — Plue: ĉiu kompreneble kunportos siajn manĝaĵkuponojn al Groet. Sed se vi eble jam nun povas malhavi kelkajn kromajn kuponojn (precipe butero estas bezonata, kaj pano, fromaĝo, sukero, lakto!) sendu ilin al s-ro Bant. Li jam donos ilin al la vendisto, kiu formos provizon por ni.

Kiu povas kunporti muzikilon, ne forgesu tion! Se vi havas flagojn, esperantajn kaj naciajn: kunportu ilin! Per ili ni ornamos la salonojn. Kiu nepre ne povos veni, sed tamen volas fari ion: sendu ornamilojn! Ĉiu laŭpove helpu sukcesigi la kunvenon!

Ĝis 25-5-'48 ni ricevis jenajn donacojn por la kunveno: S-ino E. v. V. en Limmen: 5.— g; F-ino K. v. P. en Utrecht: 5.— guld; s-ro E. J. V. en Delft: 5.— g; S-ro J. G. J. en St. Maarten: 10.— g; s-ino G. R.-B. en Beemster: 2.50 g; F-ino F en Hago: 1.— g; s-ro Joh. de L. en Schoorldam: 10.— g; F-ino M. S. en Purmerend: 2.50 g; „La Norda Stelo": 2.50 g; s-ro A. H. en St. Maarten: 2.50 g; s-ro Y: 20.— g; entute 3.50 guld.

Ni tre dankas ĉiujn donacintojn! Por efektivigi niajn planojn por la festo de la Tutmonda Junularo en Groet ni bezonos multan monon! Helpu nin en tio! Groet fariĝu por la gastoj, kio Ipswich la antaŭan jaron estis por ni! Sendu viajn donacojn por la 4-a I.J.K. al: M. v. d. Horst, Joh. Idastr. 32, Rotterdam, ĝirkonto 330139.



Partoprenantoj de la 1-a internacia Junularkunveno en Groet en 1938, kiuj dum la ekskurso al Volendam interamikiĝis kun Volendamanoj!

**Dua listo de partoprenontoj:** 27. Annie Muntjewerf (15-j.), 28. Gre Edel (16-j.) ambaŭ el Alkmaar (Ned.); 29. S-ino v. Veenendaal, Limmen (Ned.-; 30. Klaas Bant (13-j.), 31. Rie Bant (16-j.), 32. Rie Breed (13-j.), 33. Kees Groot (15-j.), ĉiuj el Groet (Ned.); 34. s-ino Rot-Bankersen (25-j.), Beemster (Ned.); 35. Tj. Heidbuurt, Leeuwarden (Ned.); 36.-37. ges-roj Symes,

38. filino Symes (10-j.), 39. G. Watkins, ĉiuj el Quain, Michinhampton (Brit.); 40.-41. ges-roj v. d. Horst, R'dam; 42 Corrie v. d. Horst (11-j.), R'dam; 43. D. Modder, Bergen (Ned.); 44. Wolo Gülting, (20-j.), Hamburgo (Germanujo); 45. D. Lenghaus, Schagerbrug (Ned.); 46. Helmi Veldhuizen (15-j.), Delft (Ned.); 47. s-ro D. Prins, Kommerzijl, (Ned.); 48. Folkert Slagter (12-j.), 49. Jelle Respens (12-j.), ambaŭ en Kommerzijl (Ned.); 50. Klaas Velting (14-j.), Oldenhove (Ned.); 51. Harry v. Laan (12-j.), Grijpskerk (Ned.); 52. Jacob Heelema (12-j.), Visvliet (Ned.); 53. Tammo Dorenbos (12-j.), Oldekerk (Ned.); 54. Albert Dalmolen (25-j.) kaj 55. Jantien Dalmolen (23-j.), ambaŭ en Grijpskerk (Ned.); 56.-57. ges-roj Krijt, Amsterdam; 58. Annie v. Ommen (11-j.), 59. Jan Foks (14-j.), 60. Bertha Kroese (12-j.), 61. Betsie Schouwink (12-j.), 62. Hennie Stoffels (13-j.), 63. Jopie Bokhove (14-j.), 64. Hennie Bokhove (12-j.), 65. s-ro H. Bokhove, ĉiuj en Hengelo (Ned.); 66.-88. 20 knaboj kaj 3 gvidantoj el Dagenham (Brit.); 89. Roger Bizet (25-j.) el Wienne aux Bois (Franc); 90. Phyllis M. White, kaj 91. Mary C. Groen el Ilford (Brit.); 92.-111. knabinoj kun gvidantino(j) el Seven Sisters (Kimrujo); 112. Henk de Bruin (13-j.) el Sassenheim (Ned.); 113. Quirinus de Rooy (13-j.) el Warmond (Ned.); 114. Peter Slieper (13-j.) el Gladbach (Germanujo); 115. Th. v. Kempen el Heemstede (Ned.); 116. J. Oosterbaan (14-j.), 117. J. v. d. Willigen (13-j.), 118. J. Gutker (13-j.), 119. P. Volger (14-j.); 120. K. Leeuwenkamp (12-j.), 121. P. Vegter (13-j.), 122. M. Wildeboer (12-j.), 123. Tr. Breed (12-j.), 124. Tr. Aartsen (12-j.), ĉiuj en Groet (Ned.); 125. Roy Aitken, Bradfort (Anglujo), 126. Herbert Cohen (17-j.) el Venlo (Ned.); 127. Suus Ivangh (13-j.) el Groet; 128. S-ro Teare, 129. George Teare (18-j.), 130. Peter B. Banks (15-j.), 131 Harold J. Leadbetter (13-j.), 132. Donald R. Lyons (14-j.), 133. Campbell H. Alla (14-j.); 134. Roger G. Dalton (15-j), 135. Edgar Tipping (15-j.), 136. Edgar White (14-j.), ĉiuj el Halewood (Brit.). Plue venos grupetoj el Bristol kaj Westerham (Britujo).

## KORESPONDADRESOJ

Ĉiu abonanto aŭ grupo unufoje jare rajtas enpresigi senpagan, dulinian korespondadreson.

**Britujo:** Vegetara instruistino, kiu vizitos Nederlandon (20-8—3-9) dez. kor. kun samideanoj. O. Robotham, 14 Wensley Rd. Stockton on Teas.

**Ĉeĥoslovakujo:** Per bildkartoj dez. kor. kun ĉiuj landoj Ladislav Strakoŝ, Ostrava, Radvanice.

**Germanujo:** 30 knaboj, lernantoj (13-14-j.) de gimnazio en Bremen, dez. kor. Skribu al: S-ro Gerh. Ziegler, Bremen, Stolberger Str. 13.

Werner Backhaus (14-j. knabo) dez. kor. kun eksterlandanoj. Adr: Auf dem Peterswerden 8, Bremen, U.S.-Zono.

**Hispanujo:** K-do Ed. Frigola, Carr, Sant Hilari, dez. kor. kun gejunuloj en la tuta mondo per il. pk. kaj interŝ. p.m. Resp. certa.

**Italujo:** Tri instruistinoj deziras korespondi kun gekolegoj. Skribu al: Ada Bonatelli, Milano, Piazza Gerusalemme 5.

**Japanujo:** Kelkaj japanaj geknaboj (proksimume 17-jaraj) dez. kor. kun nederlandanoj. Adr: Kazusuke Tada, Cuzaŭa-maĉi, Jojamaken.

**Nederlando:** Albert de Nieuwe, Steenbokstr. 18, Haarlem, dez. por siaj 30 gelernantoj (12-15-j.) gekorespondantojn el ĉ.l. Resp. certa.

Naŭ gelernantoj (10-16-j.) dez. kor. per il. poŝtk. kun Sud-Eŭropo kaj aliaj mondpartoj. Skribu al f-ino A. de Smit, Karnemelksloot, 19, Gouda.

F-ino D. H. v. Dieren, Bosstr. A 224, Winkel (NH), serĉas korespondant (in)ojn por siaj gelernantoj (11-14-jaraj).

**Polujo:** Henryk Chetkowki, Sopot, Strato Podgórna 8 (20-j. fraŭlo), dez. kor. pri ĉiuj temoj, kun la tuta mondo. Respondo certa.

B. Palczynski, Reda, K/Gdyni, dez. kor. per ilustritaj poŝtkartoj aŭ leteroj kun la tuta mondo. Precipe pri geografio. Respondo certa.


SUB LA VERDA STANDARDO.

Nova Esperanto-lernilo laŭ la rekta metodo verkita de P. Korte, lernejestro. Eld. J. Muusses, Purmerend. La plena metodo konsistas el: Gvidilo (nur por la instruisto): 2,50 guld. Laborilo I kaj II, prezo po 0,90 guld. Memorigilo: 0,50 guld.

PROPAGANDU PER LA TJO-POŜTPAPERO.

50 filioj kaj 50 kovertoj: 2,— guld.
50 kartoj: 0,75 guld.

Kiuj deziras reprezenti la **„Esperanto-Film-Grupo"n** en sia lando, bonvolu anonci sin grandnombre el ĉiuj landoj. Antwerpsestr. 45, Bergen op Zoom, Ned.

**UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO** estas la ampleksa tutmonda Esperanto-Organizaĵo, kies supertendenca, neŭtrala sinteno permesas la aliĝon de kiu ajn Esperantisto.
Per sia delegita reto, kiu ampleksas preskaŭ la tutan mondon, ĝi donas altvaloran servon al la praktika Esperantisto, por kiu la jarlibro de UEA estas konstanta konsultilo.
Petu senpagan prospekton ĉe UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo.

Jam la duan jaron regule aperas „Ukraina Esperantisto". Kiu interesiĝas pri tiu interesa gazeto skribu amase kaj petu senpagan specimenon de „Ukraina Esperantisto", (13-a), Bayreuth, Leonrodstr. 2, Bavarujo, U.S.A.-Zono, Germanujo.

**Binditaj jarkolektoj de „La Juna Vivo"** (Nur aĉeteblaj de la jaroj '34-'35, '35-'36 kaj '36-'37) estas la plej ŝatataj libroj en kurs- kaj grupvesperoj, ĉar ili enhavas lego- kaj tradukmaterialon por komencantoj kaj progresintoj, por junuloj kaj maljunuloj. — Kaj — **la prezo estas nur 1 guld!**

Ĉu vi jam posedas la novan broŝuron pri **Tutmonda Junular-Organizo?** Se ne, mendu ĝin ĉe TJO-Centro en West-Graftdijk **Prezo nur 0,20 guld. (1 int. respondkupono).**